

Dulingva eduko aŭ denaskuleco

En la mondo vivas multaj milionoj da homoj. Ili parolas tre diversajn lingvojn, kvankam ili ĉiuj formas unu homaron. La ideo de Esperanto estas krei grandan, fortikan ligilon inter ĉiuj homoj – komunan lingvon, kiu servus al interkompreniĝo.

Ne nova estas la granda ideo kaj ne nova estas la movado, kies celo estas enigi ĉi tiun ideon en niajn familiojn kaj hejmojn. Kompreneble ni ĉiuj scias, ke infanoj povas esti edukataj dulingve, ke ili povas jam dum junaĝo paroli du lingvojn. Multaj kaj multaj samideanoj provis tian edukon kaj iliaj spertoj kaj rezultoj estas bonegaj. En la gazeto "BULTENO GEPATRA" oni povas tralegi kaj enpensiĝi pri ekzemploj kaj spertoj de dulingva eduko. Ekzemple oni skribas pri kvarjara knabineto, kiu scipovas paroli esperante pli bone ol ŝia instruisto, la patro, kiu mem estas unujara esperantisto. Li devas kompletigi siajn sciojn ĉiutage vesperw, kiam la filineto jam dormas. Aŭ alia ekzemplo: Kvinjara knabo, kiu parolas kun sia instruistino flue esperante, ĉar ŝi estas ankaŭ esperantistino, dum kun sia patrino li parolas nacilingve.

En ĉiu numero de la GEPATRA BULTENO vi povas trovi multe da tiaj ekzemploj.

Kaj nun, kia estas la eduko de nia denaskido Zuzi en nia rondo familia? En nia hejmo la dulingva eduko estas farata tiel, ke la patro parolas kun la filineto nur esperante kaj ni ĉiuj aliaj ĉeĥe. Nia Zuzi, kiam ŝi komencis eligi sonojn, uzis unuan esperantan vorton "mem". Tiam ŝi estis trimonata. Estante kvarmonata, ŝi diris kelkfoje "eble", pli poste "ambaŭ", "tik tak", "eŭvo" (avo), ktp. Nun ŝi ekripetas jam ĉion, kion ni diras al ŝi. Ŝi komprenas pli multe, aplikas kaj kombinas diversajn vortetojn kune. Do, ĉiuj suferoj kaj ĝojoj nin ankoraŭ atendas. La rezulto de la patra laboro provizore ne estas granda. Dumtempe nin ambaŭ kontentigas la penso pri tiu tago, kiam Zuzanjo ekvekiĝos kun esperanta saluto al sia patro kaj kun deziro de bona tago nacilingve al sia patrino. Kaj ne malgranda estas nia ĝojo, ke en Hradec estas jam dua denaskido, kaj ke Zuzanjo havos sian denaskesperantan amikinon en la malgranda Hromas-ido.

Verkis: Zd. Hršelová

Transskribis el manuskripto: Zd. Hršel

Prelegita: